

**Esperanto -- taŭga rimedo por eduki la junularon en la spirito de la paco kaj kunlaborado** (por ILEI programo dum UK en Bonaero, 2014 Julio 29)

Mihai Trifoi, emerita instruisto, Rumanio

La statistikoj anoncas, ke dum la lastaj 5000 jaroj la mondo travivis 292 jarojn de vera paco, ke en tiu ĉi periodo okazis pli ol 14 500 militoj, grandaj kaj malgrandaj, sur la tuta planedo, dum kiuj mortis milionoj kaj milionoj da homoj.

Sed kiu statistiko povus enhavi la nemesureblajn perdojn de materiaj kaj spiritaĵaj valoroj, la neimageblajn hororojn kaj suferojn, kiuj mutilis la vizaĝon de nia tero?!

Ankoraŭ ne estingiĝis bone la fina kaj funebra gongo de la plej granda monda konflikto kaj la mondo sinpreparas por nova detruiga milito. En ĉi tia mondo, en kiu kelkaj Ŝtatoj uzas la plej novajn konkerajn de la scienco kaj tekniko por la perfektigo de la detruigaj rimedoj, en mondo, en kiu la armilaj stokoj fariĝis tiel grandaj, ke ili povus detrui plurfoje ĝin, la pacon oni devas konstrui kaj defendi. Oni devas lerni ĝin!

En tiu-ĉi kunteksto necesas strebi firme eduki la homojn, kaj unue la gejunulojn en la spirito de l'paco kaj kunlaborado. La PACO, ĉi tiu nobla kaj justa aspiro de ĉiuj popoloj, estas garantio por pli bona vivo por la homaro. Ĝin oni devas instrui kaj lerni, ĉar nur en senmilita mondo la junaj generacioj povos koncentri la fortojn por la konstruo de estonto pli bona kaj pli justa sur nia planedo.

Ni opinias, ke la lernejo, kiel la ĉefa edukfaktoro de la junularo, per bone pensitaj agoj kadre de diversaj organizoj kaj lernejaj projektoj, povas kaj devas disvastigi en la junularajn societojn la idealojn de l'paco, interkompreniĝo kaj amikema kunlaboro.

Nur konsciigante la junularon pri la danĝero de la milito kaj pri la neceso de lukto por ĝia forigo, ni povas sekurigi plusan ŝancon al paco, kies simbolo estas la bela blanka kolombo. Sed malmultaj gejunuloj konas hodiaŭ kiel naskiĝis tio.

Ni opinias, ke ĉiu infano kaj ĉiu junulo devus koni la faman pentraĵon de Pablo Picasso pri la blanka kolombo kiel simbolo de l'PACO, kaj ĝian historion, kiun ankaŭ mi legis iam kun granda intereso.

"Estis en aŭgusto 1940. La faŝistoj okupis Parizon. Multaj loĝantoj forlasis la urbon; aliaj restis por batali kontraŭ la invadantojn. La konata artisto Pablo Picasso estis inter tiuj, kiuj restis inter la muroj de Parizo por konfronti (konfrontiĝi ?) kun la invadantaj malamiko.

Iutage vizitis lin maljunulo, kiu rakontis al li pri sia granda malfeliĉo. Lia nepeto Lucien ŝatis igi la kolombojn flugi. Post la alveno de la faŝistoj Lucien ne plu flugigis la kolombojn per naztuko. Tiucele nun li uzis peceton de ruĝa flago fiksita al longa bastono. Kiam unu el la hitleraj pafistoj ekvidis lin kun la ruĝa flago en la mano, li tuj mortpafis la knabeton. Lucien falis en sanga flako. Pro la bruoj de la pafado la kolomboj forflugis timigitaj. Apud la pafita knabo restis nur unu kolombo, blanka kaj bela. Al la germana soldato ŝajnis, ke li ne faris ĉion. Li kaptis la kolombon kaj fluigis ankaŭ la sangon de la senkulpa birdo.

La maljunulo petis la grandan artiston pentri per saĝaj okuloj tiun birdon, por ke tiu pentraĵo restu je la memoro de la knabo. Picasso pentris neĝblankan kolombon gajplenan kiel esta la Vivo, la Libereco kaj la Paco.

Dek jarojn poste, dum la Monda Kongreso de la Paco en Parizo, Picasso pentris denove la kolombon, kaj hodiaŭ la tuta homaro dankas al li por ĉi tiu simbolpentraĵo".

Sed dolore ni konstatas, ke ankaŭ en la nuna tempo multaj homoj, pro malsufiĉa morala kaj spirita evoluo, nenion lernis el la malfeliĉaj okazintaĵoj de la pasinteco, kaj ĉie sur nia planedo la mortiga principo daŭre faras viktimojn. Ĝuste pro tio unu el la taskoj de la

edukistoj estas eduki la infanojn kaj la gejunulojn en la spirito de la paco kaj de la amo por siaj proksimuloj.